# auanco

1/03

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO



# Estrara Raporto pri la agado de Kuba Esperanto-Asocio dum 2002

*ENKONDUKO*

Jen nia Komitato kunsidas por analizi, diskuti kaj pritrakti la plej gravajn temojn kiuj koncernas la vivon de KEA. La jaro 2002, kies laborrezultojn ni raportos kaj analizos hodiaŭ, estis signita de multaj taskoj, kunsidoj, eventoj kaj simile. Tamen, pluraj aferoj ne marŝis kiel dezirite kaj atendite kaj, ĝuste pro tio, ni devas kun memkritika kaj kritika spirito, frate kaj pasie, funde analizi nian laboron en ĉiuj agadkampoj.

Multaj taskoj staras antaŭ ni, pluraj defioj, kiel ekzemple la 6a Tutamerika Kongreso, kies laboroj komenciĝis jam kaj plifortiĝos en la venontaj monatoj. Tiu kaj aliaj ne malpli gravaj taskoj postulas nian dediĉon kaj energiojn. Do, ni alfrontu la estontecon kun optimismo, malgraŭ multaj obstakloj kiuj certe aperos survoje. Ni konsciu ke la lando travivas, samkiel nia tuta terglobo, malfacilan periodon, kaj por multaj homoj Esperanto devus ĉiam reprezenti alternativon de espero. Do, ni devos eltrovi elirvojon kaj solvojn praktikajn al la pluraj problemoj de la ĉiutaga vivo kun nia plej alta celo disvastigi Esperanton kaj plifortigi nian movadon. Kun tia spirito ni laboru hodiaŭ!

*1. INFORMADO*

***1.1.Regula informado pri E-o, la internacia E-movado kaj KEA, pere de ĉiuspecaj amaskomunikiloj, kaj per aliaj rimedoj, kun emfazo en la grafikaj, tiel ke la ĝenerala publiko pli bone sciiĝu pri nia agado.*** Komence de la jaro, nia informa laboro estis markita de la 4a Kongreso de KEA, kio postulis de ni entrepreni diversajn demarŝojn rilate propagandon per diversaj amasmedioj: radio, ĵurnaloj kaj televido kun la konstanta valora helpo de Mario Ruiz Karell kaj Alejandro García, respektive komisiito kaj aktivulo de tiu ĉi fako. Tio alportis kontentigajn rezultojn. Tiu ĉi fako organizis kaj prizorgis materialojn por la gazetara konferenco en la sidejo okaze de la datreveno de KEA (16.06.02). Poste, ni kunsidis triope por plani la agadon en la dua jarduono, sed granda parto de la plano rilate al publikigo en provincaj gazetoj ne plenumiĝis pro nula kontakto kun respondeculoj en filioj.

***1.2.Konsciigi la membraron pri la bezono kaj graveco entrepreni personan kaj konstantan informadon pri KEA kaj E en sia medio por varbi novajn membrojn kaj amikojn de E.*** Grava parto de tiu ĉi agado estis farita en la diversaj aranĝoj pere de temaj analizoj, prelegoj kaj aliaj. Tiurilate, ni devas pli kaj pli emfazi, tiel ke niaj homoj ricevu jen en la aranĝoj, jen en la klasoĉambroj regulan informadon pri tiklaj temoj rilate al la lingvo kaj al la evoluo de la nacia kaj internacia E-komunumo.

***1.3.Eldoni ĉiujn nacinivelajn informilojn kiel parton de Avanco kaj aperigi ĝin 4-foje jare, Garantii la aperon de aliaj filiaj bultenoj kaj ties distribuon al enlandaj kaj eksterlandaj amaskomunikiloj kaj institucioj.*** Krom la kunfandiĝo de la nacinivelaj informiloj de KEA kiel parto de *Avanco*, videblas ke dum 2002 la vizaĝo de nia oficiala organo turniĝis en pli profesian.

Tamen ankoraŭ estas problemoj kunordigaj kaj manko da kunlaboraĵoj, ĉefe el ekster la ĉefurbo, kio devigas la redaktoron redakti plurajn el la artikoloj kaj prokrastigas la aperon de la numeroj. Rilate la distribuon, ni garantiis ĝian sendadon al eksterlandaj amaskomunikiloj kaj institucioj, al niaj komitatanoj kaj membroj subtenantoj. Aliflanke, kelkfoje aperis *Jajabo* (SSP), *La Giraldilla esperantista* (CHA) kaj *La Famo* (GMO). Oni ankaŭ eldonis la *Adresaron 2002* kun la celo helpi la internan informfluon, sed ĝis hodiaŭ ricevis neniun reagon el la filioj. Nur kelkaj homoj en Havano esprimis pozitivajn komentojn pri ĝi. En decembro ni komencis eldoni monatan novaĵleteron *e-informoj*, senpage sendatan al ĉiuj aktivuloj de la Asocio kun informoj pri Kubo kaj la mondo kun ĉefe esperantlingva enhavo kaj hispanlingvaj aldonaĵoj.

***1.4.Ebligi regulan aperon de KEA en la internacia E-gazetaro***. Tradicie ni havas kiel laboraspekton iel stimuli la esperantistojn kontribui al apero de KEA en la internacia E-gazetaro sed, dum 2002, tiu ĉi tasko ne estis sufiĉe vigla. Ne sufiĉas informi pri klubvesperoj, nepras organizi daŭran publikigon de artikoloj, opinioj, ktp en *Esperanto* kaj *Monato*. Krome, nia partopreno en la diskutlistoj de UEA en la reto estis preskaŭ nula. Tamen la informa agado per retmesaĝoj estis aparte vigla dum la jaro flanke de la Estraro kaj aliaj aktivuloj tra la lando, kiuj dissendis al la plej gravaj E-informcentroj ĉiujn plej gravajn novaĵojn pri la agado de la Asocio dum la jaro; dank' al tiu agado, nia asocia retadreso estas enskribita en la ĉefaj E-listoj: landa-agado, akademia-diskuto, amerika-komisiono, ktp.

***1.5.Reaperigi la oficialan hejmpaĝon de KEA kaj regule ĝisdatigi la informojn***. Oni kreis retliston pri E kaj komputiko, al kiu aliĝis kelkaj esperantistoj, sed ĝi restis burĝona. Plia laboro ankoraŭ restas nefinita, inter alie pro tempomanko de la koncerna estrarano plus teknikaj malfacilaĵoj.

## *2.NACIAJ KAJ INTERNACIAJ EVENTOJ*

***2.1. La filioj garantiu kulturan programon omaĝe al la 23-a datreveno de KEA***. Laŭ konkretaj kondiĉoj, la filioj organizis diversajn aranĝojn kaj ankaŭ diskonigis ilin. La Centra Aranĝo estis organizita en Havano en kunordigo kun la provinca filio. La okazo estis bone uzita el informa vidpunkto.

***2.2.Okazigi la 4-an Nacian Kongreson en CHA.*** De la 6a ĝis la 9a de marto okazis, en la Muzeo pri Historio de la Sciencoj *Carlos J. Finlay*, en CHA, la 4a Nacia Kongreso de Esperanto, kiun partoprenis 122 personoj el ok provincoj. Ses eksterlandaj esperantistoj venis el Belgio, Kroatio, Francio, Islando kaj Svedio. Ankaŭ ĉeestis funkciuloj de la Ministerio pri Kulturo, la Fremdlingva Eldonejo José Martí kaj de la Kuba Asocio de Lingvistoj. La kongresa temo estis "Esperanto: ĉu nur lingvo?" kaj oni pritraktis la demandon de la fenomeno E kiel lingvo, historio kaj nuntempo. Okazis prelegoj pri diversaj kulturklerigaj temoj, konkursoj, aŭkcio, turismaj programeroj kaj kulturaj vesperoj. Speciale gravan rulon plenumis la informa fako. Antaŭ, dum kaj postkongrese, ĵurnalistoj raportis, intervjuis kongresanojn kubajn kaj eksterlandajn. Grava kontribuo estis la subvencio de UEA pere de la Amerika Komisiono. La evento estis ankaŭ diskonigita en diversaj komunikiloj de la E-komunumo internacie. Sendube, la 4a Kongreso de KEA estis pinta momento travivita de nia asocio dum la jaro 2002. Multaj personoj valore kontribuis al

la sukceso de nia kongreso, kaj nia celo estas ĉiam plibonigi tiun ĉi eventon, malgraŭ multaj malfacilaĵoj, esence financaj, kiuj malhelpis al pli vasta partopreno de kubaj esperantistoj.

***2.3. Okazigi la 11an Nacian Seminarion por Instruistoj en CHA, dum majo.*** Kiel planite, efektiviĝis la 11a Nacia Seminario por Instruistoj kun la jam tradicia enhavo, teknike altvalora; tamen, nur partoprenis sep personoj el tri provincoj (GRM, SCU kaj CHA), kio vere estas bedaŭrindaĵo. Analizendas la fakto ke, iom post iom, malaltiĝas la partopreno en tiu ĉi Seminario grava por la asocia agado, kio devigas nin pli funde pripensi ĉion en rilato kun estonta strategio.

***2.4.Okazigi Nacian Infanrenkontiĝon en HLG dum julio.*** Pro diversaj kialoj, ĉefe organizaj, ne eblis okazigi tiun aranĝon en HLG, sed GMO alifoje transprenis la taskon kaj faris veran infanfestivalon, kulture tre riĉa. Entute, partoprenis sepdeko da personoj el diversaj filioj.

***2.5. Okazigi la 2an Nacian Seminarion pri Informado en SCU dum septembro.*** Surloke oni bone organizis kaj pretigis ĉion por la sukceso de la seminario; tamen, lastmomenta uragano malhelpis ĝian okazigon.

***2.6. Okazigi Nacian Renkontiĝon en GMO dum decembro.*** Kiel jam tradicie, tiu Zamenhofa Renkontiĝo okazis tre sukcese. La partoprenintoj profitis la okazon por analizi temojn rilatajn al edukado kaj kulturo. La organizintoj serioze laboris por garantii la plenan sukceson de la evento, kiu sendube imitindas. Tiaj renkontiĝoj vere stimulas la lokan movadon kaj estas inspirfonto por la esperantistaro.

***3. DISVASTIGO TRA LA LANDO KAJ REVIGLIGO DE FILIOJ***

***3.1.Labori por revigligi la movadon en la teritorioj kun jura personeco: ISJ, HAB, VCL kaj HLG.*** Dum la jaro, oni laboris por plenumi tiun ĉi taskon, sed la rezulto estis preskaŭ nula en **HAB** kaj **VCL** (en novembro oni sendis leteron al 10 esperantistoj en tiu ĉi provinco por instigi ilin kunlabori). En **HLG**, oni ĉefe laboras kun infanoj kaj la Estraro tie, malgraŭ pluraj klopodoj, ne sukcesis malfermi kurson nek impulsi la movadon. Laŭ protokoloj senditaj, ili klopodas denove aktivigi la agadon en Gibara. En **ISJ**: oni instruis la lingvon, sed ekzistas malgranda E-grupo.

***3.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en MTZ.*** La grupo de **MTZ** (Pedro Betancourt) ne avancis pro malstabileco de la surloka Estraro. Tamen, oni instruis al plenkreskuloj kaj infanoj. Menciendas la traduklaboron de José de Jesús Campos, kiu kunlaboras kun diversaj internaciaj gazetoj.

***3.3. Labori por reaktivigi la agadon en PRI, LTU, CAV kaj CFG.*** Dum la periodo, oni sukcesis reaktivigi la agadon en **CAV**, danke al la persisto de la Ĝenerala Sekretario. Nun ekzistas tie malgranda E-grupo. La reaktivigo de la agado en **PRI**, **LTU** kaj **CFG** ne efektiviĝis. La streboj de la Nacia Estraro tiucele montriĝis nefruktodonaj; pro tio, oni akcelu pli konkretajn paŝojn dum 2003. Rilate al tiu ĉi lasta provinco, oni invitis esperantiston de la filio partopreni la Seminarion por Instruistoj, celante ke li organizu kurson kaj aktivigu la agadon tie; tamen, ne okazis tiel. La estraranoj ankaŭ parolis kun Luis Manuel Vergel, sed senrezulte.

## *4. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO*

***4.1. Membro-kontrolo kaj kotizo***: Kelkaj filioj ne sendis ĝustatempe la formularojn por la membro-kontrolo kaj la koncernajn kotizojn kaj kotizkvitancojn, kaj foje tiuj malfruaj informoj alvenis kun malkongruoj aŭ kun mankoj de kelkaj bezonataj aferoj, kiuj krome malhelpis. Tamen, la tutlanda konkurado iom helpis en tiu direkto, sed ne ĉie. Ne eblas atendi ĝis la lasta momento por koni la realon ĉar tio estas malavantaĝo por nia daŭra laboro. Ĉiuj devas gajni akuratecon tiusence. Grava afero en tiu ĉi branĉo estas la ĝenerala malkresko de la mem-

STATISTIKO PRI MEMBRO-KONTROLO (1a SEMESTRO / 2002)

| | FILIO | M-3 | M-6 | M-12 | PKK | HM | TOTALO |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | ISJ | 1 | 8 | 0 | 0 | 0 | **9** |
| 2 | CHA | 45 | 63 | 21 | 1 | 0 | 130 |
| | CENTRA HAVANO | 3 | 10 | 2 | 0 | | 15 |
| | **SUBTOTALO** | **48** | **73** | **23** | **1** | | **145** |
| 3 | MTZ (P.BET.) | 8 | 8 | 0 | 0 | 0 | **16** |
| 4 | SSP | 0 | 3 | 0 | 0 | 1 | **4** |
| 5 | CAV | 0 | 0 | 0 | 0 | 1 | **1** |
| 6 | CMG | 6 | 22 | 0 | 0 | 2 | **30** |
| 7 | GRM | 23 | 16 | 0 | 37 | 1 | **77** |
| 8 | SCU | 7 | 15 | 0 | 0 | 0 | **22** |
| | STGO. CUBA | 20 | 17 | 15 | 0 | 0 | **52** |
| | **SUBTOTALO** | **27** | **32** | **15** | **0** | **0** | **74** |
| 9 | GMO | 7 | 15 | 2 | 2 | 0 | **26** |
| 10 | PKK-NE | 0 | 0 | 0 | 1 | 0 | **1** |
| | **TOTALO** | **120** | **177** | **40** | **41** | **5** | **383** |

STATISTIKO PRI MEMBRO-KONTROLO (2a SEMESTRO / 2002)

| | FILIO | M-3 | M-6 | M-12 | PKK | HM | TOTALO |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| 1 | ISJ | 3 | 9 | 0 | 0 | 0 | **12** |
| 2 | CHA | 17 | 43 | 18 | 1 | 0 | 79 |
| | CENTRA HAVANO | 0 | 1 | 3 | 0 | 0 | 4 |
| | **SUBTOTALO** | **17** | **44** | **21** | 1 | **0** | **83** |
| 3 | MTZ (P.BET.) | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | **0** |
| 4 | SSP | 0 | 3 | 0 | 0 | 1 | **4** |
| 5 | CAV | 4 | 5 | 0 | 0 | 1 | **10** |
| 6 | CMG | 52 | 60 | 0 | 0 | 2 | **114** |
| 7 | GRM | 17 | 19 | 0 | 56 | 1 | **93** |
| 8 | SCU | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | **0** |
| | STGO. CUBA | 11 | 9 | 11 | 0 | 0 | **31** |
| | **SUBTOTALO** | **11** | **9** | **11** | **0** | **0** | **31** |
| 9 | GMO | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 | **0** |
| 10 | PKK-NE | 0 | 0 | 0 | **1** | 0 | **1** |
| | **TOTALO** | **104** | **149** | **32** | **57** | **5** | **347** |

braro tra la lando, kio evidentiĝas pli kaj pli en la lastaj jaroj: 2000 (Unua semestro: 722 – Dua semestro: 529), 2001 (528 – 476) kaj 2002 (416 – 348).

***4.2. Atento kaj vizito al filioj***: Dum la jaro, la atento al filioj plenumiĝis kaj per vizitoj kaj perkoresponde, tamen, malkontentigas nin la fakto ke, pro diversaj kialoj, ne eblis al tutlandaj estraranoj viziti la filiojn tiel ofte kiel tradicie. Tio meritas reviglîĝon ĉar, pere de tiuj vizitoj, la estraranoj havas la ŝancon taksi kaj stimuli la laboron faritan kaj faratan de la surlokaj esperantistoj. Nur eblis viziti kvin provincojn (GMO, SCU, GRA, CMG kaj CAV), sed preskaŭ ĉiuj okazis en rekta rilato kun eventoj. Do, ne ĉiuj estis veraj kontrolvizitoj. Krome, funkciis neglate la atento, kiun devintus doni baptopatroj al diversaj filioj, kio estas temo analizinda niaflanke pro tio ke naciaj estraranoj povas esti pli proksimaj al la agado kaj bezonoj de siaj koncernaj baptofiloj.

***4.3. Kontrolo kaj atento al membroj-subtenantoj.*** Ni kontrolis ĉiujn membrojn subtenantojn tra la lando kaj sendis al ili n-rojn 1 kaj 2 de ***Avanco***, kaj la ***Adresaron 2002***; tamen, ni konsideras tion nesufiĉa: mankis daŭraj kontaktoj je nia flanko kaj tio vere malhelpas la agadon de la Asocio, ĉar ju pli ni atentos ilin des pli da ili ni havos. Ankaŭ en la filioj oni devas plu stimuli kaj atenti la lokajn membrojn-subtenantojn.

***4.4. Atento al komitatanoj. Flegi la internan informan fluon.*** Oni plurfoje kontaktis telefone, persone aŭ perletere kaj, samtempe, la NE daŭre sendis la monatajn protokolojn. Tamen, ĝi estas plibonigenda tasko de ĉiu estrarano.

***4.5. Plialtigi la nombron de IM de KEA en UEA.*** Rezulto de nia atento al membrojsubtenantoj kaj komitatanoj estas la membriĝo de multaj el ili kiel Individuaj Membroj de UEA. Ni sukcesis altigi tiun nombron per kromaj 38 personoj; tamen, ankoraŭ ni devas pli agadi en tiu direkto

*5. PUBLIKAJ RILATOJ*

***5.1. Rilatoj kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiu nivelo; daŭre teni viglajn kontaktojn kun la rilatorgano. Kunlabori kun tiuj instancoj laŭeble.*** La Asocio daŭre flegis siajn rilatojn kun diversaj institucioj, inter ili la Ministewrio pri Kulturo (MINCULT), specife kun la Departemento pri Kulturaj Programoj, por pritrakti la planon de eventoj 2003 kaj la Tutamerikan Kongreson. Ni partoprenis la jarkunsidon de Neregistaraj Organizoj kun la koncerna vicministro, kie ni prezentis raporton pri la en- kaj eksterlanda agado de KEA; oni alte taksis nian iniciaton por diskonigi la defendparoladojn de la kvin kubaj herooj malliberigitaj en Usono; ĝenerale, nia partopreno en tia kunsido estis pozitiva. Tamen, ni ofte devis dediĉi tempon al kunsidoj kun la juraj specialistoj por pritrakti teknikajn demandojn en la Statuto, kiuj fine estis aprobitaj de la juristoj, sed prokrastita de la rilatorgano. Pri tiu temo kaj aliaj pendantaj, ni adresis plendleteron al la Vicministro, kopie al la Ministro pri Kulturo, Ministerio pri Justico (MINJUS). Ĉimomente, la situacio ankoraŭ pendantas je analizo kaj definitiva solvo. Ni ricevis kontrolviziton de la Departemento pri Kulturaj Programoj de MINCULT, kun bonaj rezultoj. Ni ankaŭ plurfoje kontaktis la fakulojn de la Departemento pri Asocioj de MINJUS, kiel parto de nia laboro dum la jaro. Ni konsideras ke, dum 2002, niaj rilatoj kun MINCULT plioftiĝis pro diversaj kialoj, sed bedaŭrinde multfoje temis pri burokrataĵoj kiuj bremsis pli efektivajn aŭ rapidajn solvojn al

niaj demandoj. Aliaj kontaktoj okazis pro nia patopreno en internaciaj kaj naciaj eventoj, kiel librofoiroj, kio sendube altigis la rilatojn de la Asocio kun MINCULT.

***5.2. Ligi la Asocion al la kultura vivo de la koncerna loĝloko kaj altigi la influon en la komunumo.*** Niaj ligoj kun la kultura vivo de la teritorio daŭris kaj plifortiĝis kun kulturdomoj, bibliotekoj, kelkaj komunumoj kaj aliaj kulturaj instancoj, kvankam tio ankoraŭ plibonigendas, ni iras survoje al pli altaj atingoj. Tia agado bezonas pliajn konkretajn projektojn por vera efektiviĝo.

***5.3. Daŭrigi kunlaboron kun asocioj kulturklerigaj kiel Kuba UNESKO-Komisiono kaj Kuba UN-Asocio, kaj iniciati aŭ plifortigi ilin kun aliaj: Kuba Movado por la Paco, Fondaĵo Fernando Ortiz kaj Asocio de Lingvistoj.*** Ni daŭrigis niajn kontaktojn kun kelkaj el ili, sed ne tiel fortaj kiel dum pasintaj jaroj. Ni plurfoje kontaktis UN-Asocion sed ĉefe kiel kolektiva membro de tiu institucio. Fine de la jaro, oni interkonsentis kun ĝia nova Ĝenerala Direktoro, s-ro Carlos Amat, kunsidi por plani komunan laboron rilate al la venontaj jaroj. Aliaj kontaktoj okazis kun la Asocio de Lingvistoj, pere de ĝia Prezidantino, kiu ankaŭ ĉeestis la malfermon de la 4a KEA-Kongreso; i.a. aferoj, oni interparolis la eblecon okazigi en ties sidejo prelegon de eksterlanda fakulo pri E, temo pri kiu ankaŭ interesiĝas la Instituto pri Literaturo kaj Lingvistiko. Aparte menciendas la rilatoj kun Kuba Instituto de Amikeco kun la Popoloj (ICAP), kiuj estis ege fruktodonaj por KEA, tiel ke la agado de solidaraj organizaĵoj en Eŭropo plifortiĝis. Tiu ĉi solidareco, kies efiko jam komenciĝis de la antaŭa periodo, nun ampleksiĝis al pluraj institucioj tra la lando kaj ĉio pere de E. Kun Fondajo Fernando Ortiz ekzistas supraĵaj rilatoj, pro la fakto ke ni povas ion fari en rilato kun Ortiz, sed la prezidanto de tiu institucio ŝajnas ne interesita pri la afero; tamen, ni persistos en tiu celo. En la kazo de UNESKO-Komisiono, okazis neniu kontakto dum la jaro, kaj sendube ni tuj devas rekontakti ilin, celante proponi alifoje nian Projekton pri la Kariba Regiono, kaj pro la graveco ke iom post iom la rilatoj inter UNESKO kaj Esperantogajnas spacon internaciskale. Same okazis kun la Kuba Movado por Paco.

## *6. FINANCOJ*

***6.1. Flegi la internan administradon de KEA-sidejoj*.** La administraj taskoj plenumitaj dum la jaro koncentriĝis en la plua funkciado, riparado kaj aliaj laboroj de la Sidejo de KEA, kiu, dum la jaro, plenumis diversajn servojn al interesitoj, en- kaj eksterlandaj gastoj. El financa vidpunkto, por daŭre flegi la administran laboron, ni sukcesis solvi la problemon de la emeritiĝo de laboristoj pere de kontaktoj kun la oficejo pri Socia Sekureco, institucio, kiu tiucele okazigis Seminarion por niaj gvidantoj kaj nun la dosiero de la laboristoj estas pretigita. Oni devas ankoraŭ strebi por plibonigi la servojn kaj la fluon de informoj en la CO.

***6.2. Plenumi efike la buĝeton de la kontoj de KEA:*** Ni sukcesis havi apartan konton por la Kongreso de KEA, en CUP kaj en USD; tio estis tre bona sperto ĉar ni povis taksi la verajn elspezojn pro tiu koncepto. Dum la jaro, oni sukcesis garantii la esencajn servojn kaj eventojn planitajn. La buĝeto de la Asocio en ambaŭ valutoj ne plenumiĝis.

***6.3. Prizorgi la regulan funkciadon de la Komisiono pri Financoj:*** La Komisiono estis kompletigita dum la 19a Komitatkun-

sido okazinta en CHA per Jorge L. González Santillán kaj Rafael Cabrera Espinosa; kaj oni sukcesis kunsidigi ilin meze de junio, kiam oni faris la koncernan financan reviziadon nacinivele kun tre bonaj rezultoj. Ne eblis fari la duan reviziadon pro malĉeesto de du el la tri komisionanoj.

***6.4. Atenti la filiojn kaj kreskigi la konscion pri memfinancado je ĉiuj niveloj.*** Oni faris seminariojn laŭ regionoj: okcidente (nur ĉeestis CHA) kaj oriente (GRA elstare pretigis la kondiĉojn por ĝia okazigo, kiu estis sukcesa; malĉeestis CMG kaj HLG). Ekde 2001, la filioj komencis fari la pagojn pere de la banko, kio multe helpas la asocian administradon. La filioj daŭre devas insisti en la banko por indiki ĉiujn necesajn detalojn sur la pagilo aŭ sendi la numeron de la kvitanco kiun la banko liveras. La filioj ne inkludas analizojn pri financoj en la protokoloj. Nur SCU informas tion, sed tute aparte. Preskaŭ ĉiuj filioj sendas la kotizkvitancaron bonorde; sed daŭre ekzistas malfacilaĵoj en filio CHA. Oni faris tri financajn reviziojn en Centra Havano, sed la problemoj ne estis solvitaj. Ankaŭ oni kontrolis la financojn en CHA, kaj la rezulto estis bona.

***6.5. Kontrakti la servojn de CANEC.*** Oni kontraktis tiujn servojn por la reviziiado de nia librotenado dum 2002. La laboro realiĝos dum la unua semestro de 2003.

## *7. INSTRUADO*

***7.1. Regulaj kursoj.*** Dum 2002, la enskribiĝo en la diversaj niveloj naciskale estis malriĉa, kaj en kelkaj provincoj oni eĉ ne organizis kursojn. Multfoje, filioj nenion informas pri kursoj en la protokoloj. La tre sporadaj kaj tute supraĵaj ricevitaj informoj, jen persone, jen telefone, jen skribe, ne permesas al ni objektive taksi la laboron de la Asocio en tiu ĉi grava kampo, ĉar eĉ filioj kiuj tradicie sin karakterizis pro oftaj kaj ĝisdetalaj raportoj, ĉijare ne sendis ilin, kaj foje la raportoj alvenintaj estis tiel formalaj kaj informomankaj, ke el ili oni povas nenion konkludi. Kompreneble, tio tute ne signifas ke la filioj ne laboris ĉikampe, sed sen bazaj informoj, simple ne eblas fari naciskalan raporton. Tamen, jen la rezultoj eltrovitaj el la protokoloj. *(sube)*

***7.2. Kreskigi la Perkorespondan Kurson kaj daŭre atenti la enskribitojn diversmaniere.*** La rezultoj de la PkK estas ne bonaj en ĉiuj provincoj, escepte GRA, kie tiatipa kurso jam ekzistas en ĉiuj municipoj bone kontrolita de la Provinca Estraro. Ni devas sekvi tiun ekzemplon por vidi ĉu ni povos plialtigi la kvanton da lernantoj. *(tabelo sur p. 9)*

***7.3. Okazigi regionan seminarion por instruistoj por altigi ilian lingvan kaj kul-***

STATISTIKO PRI INSTRUADO

| | 1a Semestro | | | | 2a Semestro | | |
|---|---|---|---|---|---|---|---|
| | 1a | 2a | S-K | Finintoj | 1a | 2a | S-K |
| CHA | 48 | 22 | 17 | 3 | 30 | 10 | 0 |
| ISJ | 4 | 3 | 0 | 3 | 5 | 3 | 0 |
| MTZ | 21 | 10 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 |
| CMG | 0 | 0 | 15 | 0 | 0 | 0 | 0 |
| SCU | 25 | 6 | 8 | 0 | 22 | 5 | 6 |
| GMO | 8 | 2 | 0 | 0 | 0 | 0 | 0 |
| TOTALO | 106 | 43 | 40 | 6 | 57 | 18 | 6 |

| PERKORESPONDA KURSO | |
|---|---|
| Filio | Kursanoj |
| PRI | - |
| LHA | - |
| CHA | 2 |
| ISJ | - |
| MTZ | - |
| VCL | - |
| CFG | - |
| SSP | - |
| CAV | - |
| CMG | - |
| LTU | - |
| GRA | 55 |
| SCU | - |
| HLG | - |
| GMO | 1 |
| **Totalo** | **58** |

***turan scipovon.*** La regiona seminario efektive ne okazis dum la periodo, ĉefe pro manko da iniciatoj flanke de la filioj kaj manko da persisto flanke de la Nacia Estraro. Tamen Urbo Havano organizis kelkajn. Tio evidentigas ke tiusence ni devas kaj povas plu labori por stimuli kaj krei la bezonatajn kondiĉojn por ties realigo; same indas profiti pli kunordige la vizitojn de estraranoj al filioj por kunsidi kaj prepari tiajn klerigajn seminariojn.

***7.4. Ekspluati kaj profiti ĉiujn rimedojn por altigi la lingvan kaj kulturan nivelon de nia membraro.*** Certe la plimulto de la filioj ne profitas ĉiujn rimedojn tiucele. Taŭgaj kontaktoj kun la membraro tra la lando permesas konstati tion. Mankas iniciatoj kaj postuloj je ĉiuj niveloj.

***7.5. Atento al ILEI-Sekcio kaj ties respondeculoj en la diversaj filioj.*** Ni faris liston de la ILEI-membraro, esperante revigligi ĝin kaj ke ĝi estu vera sekcio de KEA kun laborplano kaj ordinaraj kunsidoj regule, sed la celo ne plenumiĝis.

## *8. KULTURAJ KAJ KLERIGAJ ARANĜOJ*

***8.1. Konsciigi la membraron pri la historiaj kaj kulturaj valoroj de la movado pere de ĉiuj disponeblaj rimedoj.*** La fakto ke, dum la jaro trideko da esperantistoj ekricevis la revuon **Esperanto** kaj aliaj materialoj senditaj de UEA, helpis la laboron de la naciaj kaj provinciaj estraranoj celanta konsciigi plenumi tiun ĉi celon. En regulaj aranĝoj, naciaj renkontiĝoj kaj en nia oficiala organo, oni ofte priparolas tiujn temojn. Antaŭ nelonge, oni distribuis informilon kun kultura enhavo celante tion. La nacia estrarano pri Kulturo devas klopodi eksterigi la konstantan laboron de la Komisiono pri Historio kaj prezidantoj de filioj devas okupiĝi pli serioze pri tiu celo.

***8.2. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultura programo okaze de la 23a datreveno.*** Okaze de la 23a Datreveno de KEA, oni organizis kaj aranĝis kulturan programon en kelkaj filioj. La ĉefa aranĝo okazis en la sidejo de Centra Havano, kiun partoprenis pli ol 60 esperantistoj kaj 40 invititoj.

***8.3. Atenti la jam ekzistantan reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj kaj varbi novajn.*** Oni kontentige laboris kun amatoraj kaj profesiaj artistoj, laŭ la cirkonstancoj kaj, kiel rezulto de tio, la kultura programo de la 4a Kongreso de KEA, la Nacia Infanrenkontiĝo kaj alispecaj aranĝoj, estis bona. Ĉirilate, daŭre fruktodonas la rilatoj kun dancensembloj, kulturdomoj kaj aliaj kulturaj grupoj. Oni ankoraŭ pli bone atentu amatorajn kaj profesiajn artistojn, kaj kulturajn instituciojn, kiuj kunlaboras kun la Asocio, kaj varbu novajn cele al la 6a TAKE.

***8.4. Stimuli la asocian reprezenton en kulturklerigaj eventoj eksterasociaj kaj***

***komunumaj*: *Partopreni la Internacian Librofoiron de Havano*.** Dum la jaro, la kultura fako de la Asocio partoprenis kulturklerigajn eventojn eksterasociajn kaj komunumajn. Menciindas la laboro farita en Guantánamo kaj Pedro Betancourt, tiuj de la pupteatro kaj speciala lernejo en Holguín, kaj la partopreno de ĉefurbaj esperantistoj en la rondo de s-ino Elba Carrillo, en Urbo Havano. Ni opinias, ke multe pli farendas en eksterasocia medio. Elstaras la sukcesa partopreno de la Asocio en la Internacia Havana Librofoiro. Tie, ni havis la ŝancon dum pli ol semajno, daŭre informi kaj konatigi Esperanton kaj la problemon de internacia lingvo al multaj homoj. Rezulte de nia agado tie kaj de niaj kromaj interŝanĝoj kun diversaj kubaj institucioj, la Nacia Libro-Ĉambro invitis la Asocion partopreni ankaŭ la Internacian Librofoiron de Sankta Domingo (Dominika Respubliko), kiu donis al KEA la ŝancon plenumi kelkajn celojn rilatajn al disvastigo kaj plifortigo de Esperanto en tiu lando, kaj speciale en la direkto informadi la ĝeneralan publikon pri la IL. Tio moviĝas rekte sur la kampo kie, de antaŭ kelkaj jaroj KEA intencas labori: etendigi la poresperantan agadon en la kariba regiono kaj, ĝenerale, en la kontinento, ĉefe pere de kulturaj institucioj. Estis la unua fojo kiam alilandaj esperantistoj vizitis Dominikan Respublikon kun la celo labori por Esperanto, kaj unuafoje ankaŭ, ke membroj de KEA vojaĝis eksterlanden kiel parto de oficiala ŝtata delegacio. Rezulte de tiu laboro, KEA ankaŭ ricevis inviton por la Internacia Librofoiro de Guadalajara (Meksiko), la plej granda en Iberameriko, ĉi-kaze ankaŭ kiel parto de la oficiala kuba delegacio (inter aliaj 60 eldonejoj), kio signifas rekonon al nia enlanda laboro kaj plifortiĝon de niaj publikaj rilatoj. En tiuj internaciaj librofoiroj, la rezultoj estis sufiĉe fruktodonaj kaj montris, ke tiu vojo ankaŭ validas por Esperanto, ĉar permesis diverstipajn kontaktojn, kaj la eblecon malfermi novajn pordojn ne esploritaj ĝis nun.

***8.5. Zorgi pri korekta utiligo de bibliotekaj servoj je ĉiuj instancoj kaj ebligi tiajn servojn en tiuj teritorioj kie ankoraŭ ne estas*.** Danke al la agado de la esperantistoj de SCU kaj GMO, oni malfermis sekcion de Esperanto en municipa kaj provinca bibliotekoj, respektive, kio levis la prestiĝon de la Asocio kaj ebligis novajn servojn al la membraro. Malgraŭ la supraj atingoj, ankoraŭ la utiligo de niaj bibliotekaj servoj naciskale ne progresas ĉar malmultaj esperantistoj interesiĝas pri tiuj servoj.

***8.6. Stimuli la filiojn okazigi regionajn renkontiĝojn kulturklerigajn*.** Laŭplanite, regiona renkontiĝo kulturkleriga nur okazis, dum 2002, en GMO, omaĝe al Zamenhof, kies rezulto estis tre bona.

***8.7. Kontroli, zorgi kaj atenti la preparlaborojn por la kultura programo de la Kongreso*.** La partopreno de esperantistoj de la diversaj filioj en la kulturaj programeroj de la Kongreso montris la bonan laboron faritan en tiu ĉi laborsfero.

**8.8. Zorgi pri la fineldono kaj presado de la esearo.** Ne eblis fineldoni ĝin pro nesufiĉa kvanto da ili kaj pro manko da instigo al tia laboro pli persiste.

## *9. INTERNACIAJ RILATOJ*

***9.1. Teni regulajn kontaktojn kun UEA, latinamerikaj landaj asocioj, ILEI, Flandra E-Ligo, aliaj landaj asocioj, lokaj kluboj, kaj aliaj E-institucioj*.** Dum la jaro 2002, ni daŭre flegis niajn rilatojn kun UEA, estis en regulaj kontaktoj kun la Amerika Komisiono per la diversaj retlistoj funkcian-

taj, daŭre interŝanĝis informojn kun landaj asocioj, aktive partoprenis la UK-on en Fortalezo, kie la 4 kubanoj partoprenintaj tie donis sian kontribuon pri diversaj taskoj en la helpa teamo de la LKK en diversaj fakoj, laboro rekonita kiel kontribuo de nia lando al la Kongreso. Ni partoprenis ankaŭ en la laborteamo de la UEA/ILEI-ekzamena komisiono, raportis pri TAKE kaj, helpe de brazilaj esperantistoj, sukcesis eldoni T-ĉemizon por propagandi la eventon. Ni ankaŭ prelegvojaĝis tra diversaj brazilaj urboj kaj starigis kontaktojn kun elstaraj homoj de la internacia E-movado, i.a. kun Sylla Chavez, Humphrey Tonkin, Michela Lipari, Atilio Orellana kaj multaj aliaj.

***9.2.Daŭra kontribuo al evoluo de E-o en Latinameriko kaj aktive kunlabori kun la regiona informilo.*** Ni daŭrigis niajn jam kutimajn kontaktojn kun landoj de tiu ĉi kontinento. Ni ne nur adresis leterojn kaj informilojn al ili, sed ankaŭ okazis personaj kontaktoj, ĉefe dum la UK en Fortalezo, kie Maritza partoprenis en la Kunsido pri Ameriko. Ofte aperis informoj pri nia movado en la regiona informilo kaj multaj personoj interesiĝis pri la poresperanta agado en Kubo, eĉ pri la ebleco vojaĝi al nia lando. Cetere, per partopreno en la internaciaj librofoiroj de Havano, Sankta Domingo kaj Guadalajara, oni starigis rilatojn kun surlo- kaj kulturklerigaj institucioj kaj esperantistaj grupoj de Dominika Respubliko kaj Meksiko.

***9.3. Funkciigi kunlaboran interŝanĝon kun unuopaj esperantistoj kaj institucioj tra la mondo.*** Oni sukcesis plifortigi la agadon de solidaraj organizaĵoj en Eŭropo, kies efiko jam komenciĝis de la antaŭa periodo; ili nun ampleksiĝis al pluraj institucioj tra la lando. Esence en Belgio, diversaj grupoj gvidataj de e-istoj, speciale de nia amiko Eddy Raats, pere de KEA, starigis ponton kun ICAP kaj la enlandaj institucioj sociaj kaj humanitaraj, ricevintaj la valorajn donacojn, tre speciale en la sferoj de Sano kaj Edukado. Rezulte de tio, pli ol 20 insulaj institucioj sociaj, prisanaj kaj edukaj, krom KEA, estis favorigitaj de tia komuna laboro. Tiu ĉi laboro devas esti daŭre flegata pro la kontribuo kiun ĝi reprezentas por pluraj homoj tra la lando kaj la prestiĝo kiun ĝi donas la Asocio.

## *10. FAKA AGADO*

***10.1.Atento al interesitoj pri faka agado tutlande.*** Oni ĉiam atentas la homojn kiuj interesiĝas pri tiu ĉi laborsfero, tamen la rezultoj ne ĉiam estas sufiĉaj. Oni devas daŭre instigi la esperantistojn tra la tuta lando al apliko de E-o en la respektivaj laborsferoj. Rilate al historio, delonge ekzistas dekkapa komisiono kiu ĉiusemajne intense laboras je diversaj branĉoj kun la dokumentaro ekzistanta ĉe ni. Tio permesis klasifi k. kontroli la plejmulton el ĉio, kion iom post iom oni enkomputiligas.

***10.2. Daŭre informi al la membraro pri apliko de E-o en scienco kaj tekniko, en- kaj eksterlande.*** Oni laboris por daŭre informi la esperantistojn pri Scienco kaj Tekniko, sed la rezultoj ankoraŭ ne estas kontentigaj tiurilate. Temas pri daŭra informa laboro, sed bezonatas pli da persisto kaj subteno de la koncernaj estrarano, komisiito kaj de la filiaj aktivuloj.

***10.3.Kontroli kaj stimuli fakulojn al utiligo de Esperanto en Scienco kaj Tekniko.*** Tiu ĉi aspekto ankoraŭ estas tre baza kaj ne respegulas la potencialon ekzistantan en la tuta insulo. Oni prilaboras malneton de dokumento pri oficiala propono de instruado de E-o kiel propedeŭtika eksperi-

mento en lernejo, sed la procezo estas sufiĉe komplika kaj la burokrataĵoj teruraj; kaj malneto de broŝuro pri E-informado, laŭ la spertoj de la pasinta Nacia Seminario pri Informado.

*10.4.Flegi la agadon de KEMA.* Pro diversaj kialoj, dum 2002, la grupo restis neaktiva, la laboro estis nula kaj, rezulte, ne estis plenumita tiu ĉi grava branĉo de la faka utiligo de Esperanto.

### *11. LIBROSERVO*

***11.1.Daŭre labori por kreskigi la stokon de materialoj kaj esperantaĵoj en la Libroservo.*** Dum la tuta jaro, ni laboradis por pliriĉigi niajn stokojn en la Libroservo per diversaj materialoj, ĉefe kasedoj. Oni ankaŭ elektis kelkajn duoblaĵojn ekzistintajn en la Centra Biblioteko por translokigi ilin al Libroservo.

***11.2. Zorgi pri la korekta kaj efika funkciado de la libroserva sistemo tutlande***: Ekde la unuaj momentoj de la jaro, oni serioze entreprenis la aferon kaj kontentige laboragadis sur tiu flanko. Menciendas la laboron de Giezi Rodríguez (komisiito pri Libroservo) dum la 4a KEA-Kongreso.

### *12. ATENTO AL ALILANDAJ ESPERANTISTOJ*

***12.1.Atento al interesitoj viziti Kubon kaj reagi al tiaspecaj informpetoj.*** Dum 2002, la komisiito pri Atento al alilandaj esperantistoj serioze laboris en ĝia fako, sub la kontrolo de la prezidantino kaj la kasistino. Li daŭre atentis interesitojn viziti Kubon, precize planis ĉion kaj efike zorgis pri tio. Parte dank' al tiu laboro, dum la jaro, pro profesiaj aŭ personaj celoj, vizitis la insulon esperantistoj (grupe aŭ individue) el diversaj landoj. El eksterlando, rimarkindas la kontribuo de Eddy Raats, kiu multe helpas la Asocion ankaŭ ĉi-fake.

***12.2. Prepari lokajn movadanojn por ĉiĉeroni alilandajn esperantistojn.*** Tiu ĉi grava laboro daŭris dum 2002, multe pli efike ol dum 2001. Rimarkindas, ke la laboro estis kontentiga rilate al disdono de taskoj, mastrumado kaj ĝenerala organizo.

### *13. TRA LA FILIOJ*

Kiel tradicie, ĉi tie oni inkludas resumon de la agado en filioj laŭ siaj jaraj informoj. Ekde nun, ni nur metos sintezan bildon pri tiuj provincoj kiuj ne aperas sub la punkto 3 (Disvastigo).

**Guantánamo**
La filio laboradis stabile en diversaj branĉoj. Elstaras okazigo de du tutlandaj eventoj: 3a Infanrenkontiĝo, kaj Metiejo Zamenhof; kaj malfermo de speciala halo pri Esperanto en la Provinca Biblioteko, kiuj montris lokan kapablecon kaj teaman agadon. Dum la jaro, ili instruis la unuan kaj duan nivelon, partoprenis en kelkaj aranĝoj, havis fortajn eksterajn rilatojn, diskonigis informojn per amaskomunikiloj, ktp. Tamen, la informfluo ne stabiliĝis pro la fakto ke regule mankis sendado de protokoloj, membrokontrolo, kotizkvitancoj, kotizoj, raportoj pri kursoj..., kio estas vera bedaŭrindaĵo, ĉar vizitoj de estraranoj al tiu filio dum 2002 montris, ke ili forte kaj efike agadas tie.

**Santiago de Cuba**
Sendube, la filio multe agadis. Ili instruis kursojn en ambaŭ niveloj dum 2002; organizis kelkajn kulturajn aranĝojn (elstaris malfermo de halo pri E-o en municipa biblioteko); subtenis efikajn rilatojn kun la ri-

latorgano, kio multe helpis la funkciadon de la filio kaj donis prestiĝon al ĝi; estis tre aktivaj rilate al propagando kaj en la organiza agado (regule kunsidis kaj sendis la koncernajn protokolojn kaj aliajn raportojn ĝustatempe); oni sukcesis etendigi la agadon al alia municipo (Il Frente). Tamen, rilate membronombron, la rezultoj estis ege malkontentigaj ĉar alifoje ĝi malkreskis (pasintjare, 106 kaj 74, en ambaŭ semestroj; ĉijare, 74 kaj 31).

**Granma**

La movado stabiliĝis kaj kreskis dum la periodo, dank' al serioza organizo, aktiva agado, forta propagando, intensaj publikaj rilatoj, ktp., ne nur en Bayamo, sed ankaŭ en aliaj municipoj, el kio fontis kresko de la membronombro. Ili okazigis ĉiujn estrarkunsidojn, partoprenis en ĉiuj tutlandaj eventoj kaj faris kelkajn kulturajn aranĝojn. Dum la jaro, ni estis bone informitaj pri tiu Filio, ĉar ĉiuj informoj alvenis ĝustatempe kun sufiĉaj detaloj, baptopatrino vizitis ĝin dum majo. Speciale imitinda estas la laboro rilate al Perkoresponda Kurso, kiu nuntempe ekzistas en ĉiuj municipoj de la provinco kaj estas sub kontrolo de la provinca Estraro per lokaj delegitoj.

**Camagüey**

La loka Estraro laboradis dum la jaro en diversaj kampoj, ĉefe rilate al instruado, fako en kiu ili sukcesis malfermi diversajn kursojn en la provinca ĉefurbo kaj en Cascorro. Speciala karaktero de tiu ĉi filio estas la serioza agado rilate al la dokumenta aspekto, kion konstatis la baptopatrino en aprilo, kaj inspektado de MINJUS dum majo, ambaŭkaze kun kontentigaj rezultoj. Rilate la membronombron, ĝi tro malaltiĝis dum la una semestro (30), sed sukcesis fini la jaron kun 114, la ununura tra la lando kiu atingis pli ol cent membroj, dum la periodo. Ilia plej malkontentiga flanko estas la interna informfluo, ĉar plurfoje la dokumentoj ne venas ĝustatempe al la Estraro, aŭ ili simple mankas.

**Sancti Spíritus**

Tiu ĉi filio estas inter la plej stabilaj kaj akurataj en la sendado de informoj al la Estraro, kun ĉiuj detaloj laŭfake, eĉ la Jara Raporto, kaj tio ja validas. Rilatoj kun MINJUS kaj kelkaj institucioj daŭre stabilis. Krome ni konstatis, ke ili multe laboris por sukcesigi la okazigon de tiu ĉi Komitatkunsido kaj por la inaŭguro de omaĝtabulo al Mangada, en lia naskiĝdomo. Tamen estas bedaŭrindaĵo la tiea situacio rilate al la movado, ĉar ĝi, iom post iom, malaperas. Malgraŭ la daŭra propagando, reago al kursoj ne estis. Meritas rekoni la seriozecon kaj justecon de la prezidantino kaj la ĝenerala sekretario en rilato kun la informoj, ĉar neniam ili kaŝas la veron.

**Urbo Havano**

Dum la tuta jaro, la filio laboradis surbaze de laborplano en ĉiuj sferoj. Ili okazigis ĉiujn ordinarajn kunsidojn kaj liveris al la Estraro protokolojn kaj aliajn dokumentojn ĝustatempe. Menciindas la laboro rilate kulturajn aranĝojn (53) kaj la instrua laboro (renkontiĝoj kun la lernantoj, kaj aliaj kun instruantoj, seminarioj pri gramatiko, legoklubo...). Rilate al informado, oni garantiis regulan diskonigon pri E-o kaj la agado de KEA per naciaj kaj provincaj radiostacioj, kaj uzis grafikan propagandon, ĉefe por varbi interesitojn por niaj kursoj. Tamen, ili ne sukcesis reteni la jam tradician membranombron (el 204 en la dua semestro 2001, ili venis al 145 en la unua de 2002 kaj 83 en la dua).

## ĈEFAJ TASKOJ POR LA JARO 2003

### 1. INFORMADO KAJ ELDONA-AGADO

1.1. Ekstera informado pri E-o, la internacia E-movado kaj KEA, per la tradiciaj amaskomunikiloj.

1.2. Aktive partopreni la UEA-kampanjon *Por pli vasta komunumo* por varbi kaj grandigi la membraron de KEA.

1.3. Utiligi ĝisdatigitajn informilojn de UEA kaj produkti proprajn pri E-o kaj ĝia movado por internacia kaj landnivela uzoj, kaj zorgi pri ilia distribuado.

1.4. Produkti kaj eldoni la oficialan organon *Avanco* (4-foje jare) kaj la E-informilon de la NE (11-foje jare).

1.5. Atenti kaj proponi eldonan planon kongrue kun difinendaj prioritatoj de la Asocio ene de la kulturpolitiko de UEA.

1.6. Kunlabori aktive por starigi kaj regule aktualigi la esperantan paĝon de RHK, tiel ke ĝi provizu informojn pri E-o kaj KEA. Atenti la jam ekzistantan kaj stimuli la kreadon de aliaj hejmpaĝoj tra la tuta lando.

### 2. EVENTOJ

2.1. Okazigi la 20-an Komitatkunsidon de la 24a ĝis la 26a de januaro en Sancti Spíritus.

2.2. Okazigi provincajn seminariojn pri aktivula trejnado en SCU (februare), GRA (marte), CHA (maje), GMO (julie) kaj CMG (novembre).

2.3. Partopreni la Havanan Internacian Librofoiron, en januaro/februaro.

2.4. Okazigi nacian metiejon Zamenhoftago en Guantánamo, en decembro.

2.5. Partopreni la 88-an UK-on kaj ILEI-Konferencon en Svedio.

2.6. Okazigi la 4-an Kulturan Festivalon en Santiago de Cuba, en novembro.

2.7. Okazigi renkontiĝon de KEATUR en Baracoa, en junio.

### 3. DISVASTIGO

3.1. Daŭre labori por aktivigi la movadon en PRI, LHA, VCL, CFGkaj LTU.

3.2. Labori por kreskigi kaj firmigi la movadon en CHA, MTZ, SSP, HLG, CAV, SCU kaj GMO.

### 4. ORGANIZAJ DEMANDOJ KAJ INTERNA ADMINISTRADO

4.1. Membro-kontrolo kaj kotizo unufoje jare.

4.2. Atento kaj kontrolvizitoj al filioj.

4.3. Sendado de KEA-informiloj al Membroj-Subtenantoj.

4.4. Flegi la informan fluon al la Komitato. Partoprenigi komitatanojn en la ordinaraj estrarkunsidoj.

### 5. FINANCOJ

5.1. Flegi la internan administradon de KEA-sidejoj.

5.2. Kontroli la plenumon de la buĝetoj de KEA en CUP kaj USD.

5.3. Atenti kaj kontroli la filiojn kun emfazo en la konscio pri memfinancado kaj travideblo en ĉiuj niveloj.

5.4. Kontroli kaj prizorgi la libroservon kaj labori por kreskigi ĝian stokon. Flegi ties efikan funkciadon.

### 6. INSTRUADO

6.1. Flegi la okazigon de la regulaj kaj aliaj kursoj tutlande kaj kontroli ties kvaliton metodologie kaj lingve. Garantii la bazajn lernomaterialojn.

6.2. Aktive partopreni la UEA-kampanjon *Por pli vasta komunumo* por varbi interesitojn kaj kreskigi la kvanton de lernantoj en la diversaj kursoj, speciale en la PKK.

6.3. Revigligi la kategoriigon de membroj kaj utiligi tion kiel kondiĉo por decidi pri partoprenontoj en eventoj.

6.4. Flegi la instruan rolon de la oficiala organo de KEA.

6.5. Kontroli kaj atenti la instruistaron (ILEI-Sekcio) metodologie kaj lingve.
6.6. Flegi la rilatojn kun ILEI kaj laŭeble partopreni ties edukan projekton *Interkulturo*.

### 7. PUBLIKAJ RILATOJ

7.1. Daŭre flegi la rilatojn kun politikaj, registaraj, edukaj kaj kulturaj instancoj je ĉiu nivelo. Speciale atenti la rilatojn kun ICAP.
7.2. Plifortigi la rilatojn kun la rilatorgano. Flegi la korektan plenumon de la Rilatkontrakto.
7.3. Plifortigi la rilatojn kun UN-Asocio kaj UNESCO-Komisiono per konkretaj planoj aŭ projektoj (Karibio kaj KEA), kaj Asocio de Lingvistoj.

### 8. INTERNACIAJ RILATOJ

8.1. Daŭre flegi la kontaktojn kun UEA, landaj asocioj, Internacia E-Instituto kaj kluboj.
8.2. Plifortigi la solidarajn rilatojn kun landaj asocioj, kluboj kaj amikaj organizaĵoj. Aparte flegi la rilatojn kun FEL kaj La Amikoj de Kubo.

### 9. KULTURO

9.1. Kontroli kaj atenti la kulturajn programojn de la asociaj aranĝoj kaj eventoj. Flegi la reton de amatoraj kaj profesiaj artistoj.
9.2. Stimuli la partoprenon en eksterasociaj eventoj kulturaj kaj klerigaj. Partopreni la Havanan Librofoiron.
9.3. Aktive partopreni la UEA-kampanjon *Savi esperantaĵojn* kun la celo prizorgi kaj savi historie valorajn esperantaĵojn en niaj bibliotekoj. Atenti pri la korekta utiligo de la bibliotekoj tutlande.
9.4. Stimuli la filiojn okazigi lokajn kaj regionajn kulturklerigajn aranĝojn.
9.5. Kontroli kaj atenti la kulturan programon de la 6a TAKE.
9.6. Aktive partopreni la kulturklerigan vivon de la komunumo per konkretaj programoj/eventoj.

### 10. UTILIGO DE ESPERANTO

10.1. Starigi aŭ plifirmigi kontaktojn kun internaciaj organizaĵoj pri medicino, turismo kaj aliaj, laŭ la prioritatoj.
10.2. Daŭre informi kaj stimuli la membraron pri utiligo de E-o en Scienco kaj Tekniko. Atenti la okazigon de fakaj renkontiĝoj.
10.3. Atenti interesitojn viziti Kubon kaj ties informpetojn. Disvastigi informojn pri utiligo de E-o por turismado.
10.4. Instigi partoprenon de la Asocio en eventoj de fakaj institucioj per konkretaj programoj.
10.5. Prepari lokajn esperantistojn informe kaj lingve por atenti alilandajn vizitantojn.
10.6. Prizorgi la turisman programon de la 6a TAKE.

**Rimarko**: La Ĉefaj Taskoj de KEA daŭre estas la gvidlinioj de la Asocio kaj enhavas difinitajn aspektojn celantaj la plenumon de la ĝenerala laborplano por la periodo 2001-2004, aprobita en la 18a sesio de la Nacia Komitato, en la jaro 2001. Ĝi entute kongruas kun la celoj de la Strategia Laborplano de UEA por la periodo 2001-2010.

**Oficiala Organo de**
**Kuba Esperanto-Asocio**
(1/2003)
Aperas 4-foje jare
Eldonas:Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120, 10500 Havano, Kubo
Telefonoj: ++53(7)53 9102 kaj 40 4484
Fakso: 649 8729
Retadreso: kubesp@enet.cu
Speciala numero
Ĉefredaktoro:
Alberto García Fumero
Revizias kaj kontrolas:
Maritza Gutiérrez González
Enpaĝigo:
Alberto Fdez-Calienes Barrios

6a TUTAMERIKA KONGRESO DE ESPERANTO
Havano 2004

21a -27a de marto 2004
Havano, Kubo

**Kia Esperanto-movado por Ameriko?**



# auanco

OFICIALA ORGANO DE KUBA ESPERANTO-ASOCIO

Kuba Esperanto-Asocio
Poŝtfako 5120, CU-10500 Havano, Kubo
Telefonoj: +53(7)40 4484, 53 9102 Fakso: 8408729
kubesp@enet.cu

Ciferecigis: Javier Ramos
@Radioamatoro